## La praloĝantoj de Kubo: kelkaj konsideroj pri iliaj vivo kaj lingvo

*Juan Lazaro Besada Toledo*

Pri la praloĝantoj de Kubo oni multon verkis kaj esploris, ĝuste pro tio ni nur supraĵe tuŝos kelkajn aspektojn rilate al iliaj vivo kaj lingvo, ĉar kvankam pri etnaj lingvoj en Ameriko abundas bonegaj verkoj, pri la kubaj aborigenoj ne facilas trovi ampleksan literaturon.

Tiucele dezirindas dediĉi nian atenton unuavice al la deveno de niaj unuaj loĝantoj. Ili atingis nian insulon verŝajne post multnombraj kaj senĉesaj vojaĝoj tra insuloj apartenantaj al la Kariba Maro kaj Antiloj, pro komprenebla pilgrimado baziĝinta sur la evoluprocezoj de aliaj komunumoj tiutipaj enradikiĝintaj en nia kontinento.

Civilizacioj, kiujn oni trovis en Meksikio, Peruo kaj Ĉilio estis riĉaj kaj prezentis imponajn imperiojn, kiuj estis la inkaa kaj la majaa. Tamen, la loĝantaro de Antiloj ne posedis tiajn vivrimedojn kaj kondiĉoj por havigi al si pli establitan vivoformon, obee al tiu jam menciita nomadeco de iliaj vivoj.

Evidentas, ke neniu el la praaj etnaj triboj lokiĝintaj en Kubo akiris folkloron, nek historion tiom evoluintajn.

Unu el al ĉefaj trajtoj influantaj –eble decide– la evoluon de la sudaj kaj centramerikaj triboj estis la klimato, kiu siavice malfavoris nian loĝantaron. Dum la etnaj triboj enradikiĝintaj en la sudo kaj centro de nia kontinento devis alfronti tute malfavoran medion kaj ege malfacilajn vivkondiĉojn, kio helpis al ili atingi pli grandan adaptiĝemon kaj superan socian organizon, la malpli evoluintaj triboj preferis nomadan vivon, kio malefikis la normalan evoluon, kiun ili estus devinta atingi.





Ni nun turnu nian atenton al nia propra historio, enprofundiĝante en la radikojn de nia popolo tiel ke oni povu priskribi, almenaŭ elemente, la unuajn tempojn de ties historio.

Necesas rimarki, ke dum la 1950a jaro okazis nialande konferenco pri Arkeologio de la Kariba regiono, kies ĉefa celo estis analizi la eblecojn unuigi ĉiujn prahistoriajn kulturojn troveblajn en nia insulo. Tiu konferenco rezultigis la dividon de nia praloĝantaro en tri kulturaj grupoj.

### Unua kulturgrupo

Nun ni referos al la unua kulturgrupo kiu loĝis en Kubo, nome Siboney, aspekto Guayabo Blanco, plej bone konata sub la nomo *Guanajantabey*.

Pri tiu grupo oni devas diri, ke ĝia antikveco en la Antiloj kalkuleblas je proksimume 4000 jaroj, kvankam ili atingis nian landon nur 1000 jarojn antaŭ nia erao.

Pri ili notindas, ke esploroj de la eminenta arkeologo Rouse en 1964 indikas al ni ilian sudamerikan devenon.

Ankaŭ menciendas, ke en 1927 José A. Cosculluela trovis funebran kavernom en Guajamales, Agramonte, provinco Matanzas. Tie oni elterigis tutan tombon tre malbone konservitan kaj sukcesis trovi ilaron el ŝtonoj kaj konkoj primitive faritan, kiun oni precizigis kiel apartenanta al tiu grupo. Oni povas aldoni, ke en 1961 kaj 1962, pere de elterigoj faritaj en funebra kaverno ĉe Bacuranao, Havano, oni trovis kroman dudekon da tomboj kaj ankaŭ pistmartelon tre praan, kio sendube karakterizas la kulturon de tiu grupo.

Pri iliaj tomboj ni povas diri, ke ĉiuj kadavroj orientiĝis samdirekte, tio estas de okcidento al oriento, kun la kapo direkte al tiu lasta punkto. Foje ili kuŝis sur unu flanko, foje dorse kaj en malmultaj okazoj bruste. Necesas klarigi, ke en tiuj tomboj oni trovis nenian funebran oferon.

Ili ne uzis ceramikaĵojn, kio evidentiĝas el la fakto, ke oni ne trovis ujojn el bakita argilo. Iliaj ujoj kaj aliaj hejmaj iloj estis faritaj plejĉefe el markonkoj.

Se oni trastudas serioze kaj funde la verkaron de nia famekonata antropologo kaj historiisto Ernesto Tabio eblas aserti, ke siliko estis tre malabunda ĉe tiu grupo kaj ke, se ili konis ĝin –laŭ la atestoj de arkeologiaj malkovroj– ĝi estis uzata nur en formo de eroj kun tre rustika ellaboro.

Pri ilia somato oni povas diri, ke ili estis krudaj homoj kaj ilia staturo estis meza. Iliaj kranioj estis normalaj, kio indikas al ni mankon de praktiko rilate kraniajn misformigojn, kio fakte abundis en aliaj triboj.

Iliaj laboriloj estis tute elementaj, ĉar ilin uzis la tribanoj nur por ĉiutagaj laboroj kiel frapi, tranĉi, piki kaj forigi, ĉar ili interesiĝis nur pri garantiado de la minimumaj vivkondicoj.

Iliaj bazaj ekonomiaj agoj estis unue la rikoltado de vegetalaj nutraĵoj, ĉasado de diversaj bestoj nome birdoj, insektoj kaj cetere kaj fine, la rikoltado kaj kaptado de moluskoj, krustacoj kaj fiŝoj.

Tiu rikoltado implicis tutan produktprocezon, kiu kongruis kun la evolunivelo de ilia socio.

Pri iliaj loĝejoj oni povas diri malmulton. Eblas nur konjekti, ke ili ĝenerale loĝis en kavernoj proksime al la marbordo, kvankam tio ne ekskludas la eblecon, ke kelkaj komunumoj estus loĝintaj en loĝejoj faritaj el arbobranĉoj tre primitive konstruitaj.

Gravas diri, ke la grupo Guanajatabey jam konis la fajron, kvankam ni devas rimarki, ke ili uzis ĝin nur kiam necesis por ilia vivo.

Dua kulturgrupo

Post analizi kelkajn bazajn trajtojn de la unua grupo supre menciita, ni dediĉos trarigardon al la dua aborigena komunumo loĝinta en Kubo laŭ ilia graveco. Ĝi estas la grupo, kiun oni konas sub la nomo *Siboney, aspekto Cayo Redondon*, aŭ tute simple *Siboney*.

Unue, ni diros pri ili, ke evidentigajn restaĵojn pri tiu grupo kaj ties kulturo oni trovis ĉefe en la provinco Camagüey kaj en ĉiuj aliaj orientaj regionoj de nia insulo, kio permesas aserti, ke ĝuste tie ili kutimis lokiĝi.





Dum arkeologiaj esploroj realigitaj en 1960 en Manzanillo, Granma, oni trovis tombejon, el kie la esplorantoj elterigis kvantegon da skeletojn, kiu sumis inter 30 kaj 40. Ili estis tre difektitaj kaj formis specon de triobla linio. Kelkaj el la skeletoj aperis situitaj en dorsa dekubito kaj aliaj en ventra dekubito; ĝenerale piedoj direktiĝis al oriento kaj la kapo al okcidento. Kelkfoje la kruroj estis sternitaj kaj kelkfoje fleksitaj sur la korpo. Ankaŭ menciendas, ke en kelkaj kazoj la kranio de iu skeleto kuŝis sur la piedoj de alia. La plej rimarkinda fakto de iu tombejo estis la multnombra kvanto da konkoj, ŝtonoj kaj ŝarkodentoj kiun oni trovis tie.

Certagrade signifaj elterigoj estis tiuj de Pichardo Moya kaj Martinez en 1942 kaj 1943 respektive kaj tiuj fare de Herrera Fritot, Morales Patino kaj aliaj en 1941.

Oni trovis dum tiuj elfosadoj interesan amasan tombon konsistantan el 13 infanoj, kies aĝoj oni kalkulis proksimume inter 1 kaj 10 jaroj. Pri ĝi sciigas nin Herrera Friot ke: "... apud ĉiu skeleto oni metis ŝtonajn bulojn, kies mezuroj ŝajne akordiĝis al la aĝo de ĉiu individuo". Oni ankaŭ atingis dum tiuj laboroj 13 ŝtonajn bulojn, 2 hakiletojn kaj kelkajn aliajn objektojn.

En 1957, pere de elfosadoj fare de Guarch kaj Pallarés en la bieno "El Castillo", Camagüey, ili trovis interesan tombon, kiu donas al ni novajn sciigojn pri tiu aborigena grupo. La arkeologoj priskribas tiun tombon jene: "...ili kuŝis en dorsa dekubito kaj estis direktigitaj de oriento al okcidento kun la kapo vide al tiu ĉi lasta punkto. La dekstra brako levita kaj fleksita kaj la mano je la alteco de la kapo kaj fronte al la vizaĝo. La maldekstra mano kuŝis surbruste. Kruroj estis leĝere flektaj unu sur la alia, kio memorigas nin pri la feta pozicio. La kranio prezentiĝis kiel la plej bone konservita korpoparto. Malgraŭ ke ĝi estis fendita, ĝi ne prezentis artefaritajn misformigojn kaj la dentaro enradikiĝis en fortika maksilo".

Rilate al la ilaro, kiun tiu grupo uzis, ni povas aserti, ke ili malmulte konis la ceramikon. Tamen restaĵojn el diversaj tiutipaj ujoj oni trovis dum la esploroj, kio pravigas nin diri, ke almenaŭ elemente ili praktikis tiun arton, kvankam tre krude, ĉar la elterigitaj havis primitivajn formon kaj ellaboron.

Se eblas diri, ke kompare kun la antaŭ priskribita grupo, ili prezentis pli superan evoluon, tamen necesas emfazi, ke tiu grupo ankoraŭ ne montris sufiĉajn pruvojn rilate al novaj produktoformoj, se oni konsideras la atestojn, kiujn arkeologiaj malkovroj disponigas al ni.

Ni ne neglektu la fakton, ke tiu ĉi grupo jam montris –laŭ la konitaĵoj ĝis nun atingitaj– evidentajn spurojn pri agrikulturaj laboroj.

Ankaŭ la fakto, ke la ĉasado estis por ili pli grava ol fiŝkaptado, pruvas, ke tiu grupo havis pli superajn ideojn ol tiuj de siaj antaŭuloj, ĉar ne preterlasante la rikoltadon, jam aperis ĉe ili intereso pri aliaj laboroj, kiuj instigis ilin serĉi novajn vojojn rilate al la ekonomia agado.

Interesa trajto pri tiu grupo estas, ke ili jam komencis la konstruadon de loĝejoj, kiuj spite ties praecon evidentigas ilian bezonon plibonigi la ĝistiaman vivoformon, reformante la medion kiu ĉirkaŭis ilin kaj profitante la rimedojn, kiujn la naturo oferis al ili.

Kiel neceso fontinta el la natura memevoluo, la aborigenoj de tiu grupo bezonis veturilojn por la efektivigo de kelkaj iliaj agoj, kiuj estis nepraj por la vivtenado. Tiuj homoj ilin uzis kaj pro tio, spite al manko de arkeologiaj malkovroj tiurilate, eblas konjekti teorion pri ekzistado de boatetoj, ĉar ni tutcerte scias, ke ili laboris per ligno. Apogon ni trovas en la Taglibro de Kristoforo Kolombo, kie li skribis: "...en unu el tiuj insuloj... ni vidis boateton ene de kiu kelkaj indianoj fiŝkaptis..."

Ja pri tiu grupo kaj ties lingvo ni povas senriske aserti, ke ili posedis tian, ĉar malgraŭ niaj preskaŭ nulaj scioj pri tio, fakte kelkaj tiamaj kronikistoj asertis, ke la interpretistoj akompanantaj la Admiralon dum lia dua vojaĝo kapablis interkompreniĝi kun la ĉi–tiea loĝantaro.

Pri tiu grupo Siboney oni povas diri, ke ili jam dediĉis sin al artaj kreaĵoj. Pruvojn pri tio oni trovis en la provincoj Pinar del Rio, Matanzas kaj la centraj provincoj, kie la arkeologoj sukcese malkovris ne nur pentraĵojn, sed ankaŭ tajlaĵojn el ligno.





En Pinar de Rio oni trovis hokbastonon tre duran el nigra ligno, entenanta kelkajn tajlaĵojn, kiuj, laŭ la opinio de la arkeologo Harrington, "tre similas al tiuj de Sudameriko kaj Polinezio".

<u>Tria kulturgrupo</u>

Nun ni turnos nian atenon al la plej grava etna grupo kiu lokiĝis en Kubo dum tiu praa periodo de nia historio, grupo kiun oni nomas *Tainoj*.

Ilia deveno estas sudamerika kaj kelkaj historiistoj pravigas teorion rilate al tio jam supre dirita. Tiu pilgrimado tra la Antiloj kaj posta lokiĝo en diversaj insuloj, kaŭzis al ili la perdon – en tre longa periodo – de iliaj kontaktoj kun la kontinento, plejĉefe kun la araŭkana raso, el kiu ili fontis. Pro tio kaj spite ĉiujn kontraŭajn opiniojn tiusence, ni klasifikas ilin kiel plene antilajn.

La unuan mencion, kiun ni trovas pri tainaj materialoj, ni ŝuldas al hispana esploranto Miguel Rodriguez Ferrer kiel rezulto de liaj laboroj ĉe Baracoa, en orienta parto de nia insulo en 1847.

En 1890 nia elstara saĝulo kaj natursciencisto Carlos de la Torre malkovis en la "Kaverno de Ponce", Baracoa, kelkajn ostojn kaj malmultajn fragmentajn de aborigena ceramiko. Krom tio, li sukcesis trovi misformigitan kranion kaj kelkajn petaloformajn hakilojn kaj potojn el argilo, kiuj prezentis desegnaĵojn pri homoj kaj bestoj kaj aliajn objektojn.

Ili situas en 26 diversaj lokoj de nia teritorio, sed iliajn ĉefajn amasejojn oni povas fiksi en Baracoa, Guantánamo kaj Maisi, oriente en nia lando.

Tiu grupo ne plu loĝis en kavernoj, kaj nur en 11 naturaj rifuĝejoj oni trovis restaĵojn pri ili. El tiuj rifuĝejoj nur 4 estis ŝajne destinitaj por loĝado.

Pri iliaj tombejoj ni havas abundajn sciojn. Laŭ Harrington "la unua skeleto estis de plenaĝulo, kiun oni entombigis faldita, kuŝanta sur la maldekstra flanko, kun la kapo direktita al oriento". Pri la dua skeleto trovita, la sama esploristo informas la jenon: "ĝin oni malkovris enterigita je 0.56 m, kuŝanta sur la dekstra flanko, kun la genuoj fleksitaj kaj la kapo

direktita al nordokcidento. La dekstra mano kuŝis sur la ventro kaj la maldekstra sub la barbo /.../ "la kranio, pro ĝia bedaŭrinda stato, permesis konkludi, ke oni ĝin penpremigis".

Ni ne forgesu rimarki la fakton ke el ĉiuj aborigenaj grupoj loĝintaj en nia lando, nur tainoj konatiĝis kun ceramikarto kaj praktikis ĝin.

En diversaj elterigoj realigitaj, oni trovis abundan kvanton da ceramikaĵoj kiel ujoj, pupoj, totemetoj kaj aliaj. Pri la ujoj el argilo ni povas diri, ke ilia dimensio varias inter 15 kaj 40 cm diametre kaj inter 8 kaj 20 cm altece.

La ceramikaĵoj de tiu grupo ankaŭ karakteriziĝas pro polurigo kaj prezentas muldteknikon rilate la ellaborojn de ansoj.

Rimarkindas, ke iliaj ŝtonaj iloj estas variaj kaj abundaj, en kelkaj kazoj artece faritaj. Inter ili ni citu hakilojn, ĉizilojn, pistilojn, morterojn kaj konkojn, kiujn ili faris el siliko.

El ligno ili sukcesis konstrui boatojn (kelkaj el ili vere grandaj), ornamitajn remilojn (ĝenerale kurtajn), bastonojn kaj multe da alilaj diversaj aĵoj.

Pri ilia aspekto ni citu vortojn el la Taglibro de Kristoforo Kolombo, "fizike tre bon–aspektaj, de belegaj figuroj kaj vizaĝoj, hararoj kurtaj kaj dikaj kvazau ĉevalvostoj...". "Kaj ĉiu el ili havas frunton kaj kapon ampleksajn, pli ampleksajn ol tiuj de ĉiuj aliaj indianoj jam de ni renkontitaj ĉi tie. Iliaj okuloj estas belegaj kaj ne malgrandaj".

Iliaj ekonomia vivo kaj organizo jam montris al ni pli seriozan agadon, ĉar krom ĉaso, fiŝkaptado kaj ceramikado, ili dediĉis sin al la agrikulturo. Celante atingi bonajn rikoltojn, pro la abundeco de arbaroj en nia insulo, ili devis serĉi ebenaĵojn por semi, kio fakte influis la aperigon de semado en eĝoj.

Indas emfazi la fakton, ke niaj tainoj konatiĝis kun kaj uzis semadformon, kiun oni nun uzas por kultivado de tabako kaj sukerkano, kio estas evidenta pruvo de la evoluo atingita de tiu aborigena grupo.





Jam ĉe ili aperis klasdivido ene de la socio kaj ties ĉefaj reprezentanoj estis nome: kaciko aŭ tribestro kaj behiko aŭ sorĉisto.

Se interesa estas la historio de niaj aborigenoj, pri kiu supraĵe ni jam parolis, tre interesa estas ankaŭ kio rilatas al ilia lingvo.

<u>Lingvaĵo de la praloĝantaro</u>

Pri tiu temo ni fokusas nian rigardon celante informi vin pri la lingvaĵo de nia praloĝantaro.

Surbaze de libro verkita de franco, kiu akompanis la malkovrinton de Ameriko dum unu el liaj vojaĝoj al tiu mondregiono, ni eksplikos kelkajn esencajn trajtojn pri tiu temo.

Kompreneble, ĉiuj praaj komunumoj havis tre primitivan ideon pri lingvo, kiun ili alĝustigis al bezonoj komuniki ĉefe esencaĵojn.

Tiel do, ni komencos nian trarigardon kun kelkaj definoj, kiujn ili donis kaj kiuj havas pli ol unu sencon aŭ aplikon.

Ekzempligante niajn suprajn vortojn ni diru, ke por nomi haŭton ili uzis vorton NORA, kies ĝenerala senco estis ĉio, kio kovras.

Vejnojn kaj nervojn ili nomis per la vorto NILLAGRA, kies signifo etendiĝis ankaŭ al arboradikoj.

Kelkaj troveblaj kunmetaĵoj ĉe nia aborigena lingvaĵo:

| | |
|---|---|
| Miaj okuloj | NAKU |
| Miaj pupiloj | NAKU EUKE |
| Miaj palpebroj | NAKU ORA |
| Miaj cilioj | NAKU IU |

| | |
|---|---|
| Mia piedo | NUGUTI |
| Miaj piedfingroj | NUGUTI RAIM |
| Mia piedplanto | NUGUTI ROKU |
| | |
| Loĝanto | BONON |
| Insul–loĝanto | UBAO BONON |
| Kontinent–loĝanto | BALUBE BONON |

Estas multe da esprimoj pri la familia parencaro, kiujn oni povas konsideri neeblaj en tiu praa epoko. Jen kelkaj:

Mia patro: ĝenerale ili uzis la vorton BABA; sed se temas pri viro parolanta al virino ili diris JUMAAN, kaj se virino parolas al viro tiam la vorto estas NUKUĈILI.

Mia nevo: HIBALI; tiun vorton ili uzis por signi ambaŭ seksojn.

Mia bopatro: HIBALI–MUKU; tiun vorton ili uzis por ambaŭ seksoj kaj havis kroman signifon, kiu estas: "neponaskiganto".

Mia filino: NIANANTI se estas viro kiu parolas al virino, aŭ NIRAHEU se virino parolas al viro.

Mia kuzino: YUELLU; tiu vorto signifis ankaŭ mian fianĉinon.





Serĉante inter la adjektivoj ni trovas interesajn vortojn, kiuj meritas pripensadon; jen kelkaj:

dika: TIBULELI;

maldika: TULEELI;

ĉu eble la vortelementoj IBU kaj ULE montras ekzistadon de afiksoj? Tion ni konjektas el la vortoj, kiujn ni sube montras:

alta: INUTI;

malalta: ONABUTI.

Kaj pri la koloroj ni montros ion, kio ŝajnas interesa:

blanka: ALUTI;

nigra: ULITI;

flava: HUERETI;

ruĝa: PONATI.

Ĉu tio indikas eblan komunan finaĵon por adjektivoj? Kaj kion ni povas diri pri la jeno:

riĉa: KATAKOBAITI;

malriĉa: MATAKOBAITI.

El verboj facilas konkludi, ke preskaŭ ĉiuj el ili finiĝas per literoj a, e, en, i, kio verŝajne montras eblan sistemigitan konjugacion. Tamen, ni suspektas, ke oni povas tion kredi nur elemente, pro la malmulta evoluo de tiaj socioj.

Sekve ni prezentas resumajn tabelojn pri nia esploro, baziĝinta sur vortaro el preskaŭ 400 eroj, kio permesas iom kaj iel lumigi tiun aspekton rilate al la lingvo de nia aborigena loĝantaro.

Distribuo kaj procento de literoj laŭ ilia apero ĉe 272 aborigenaj vortoj.

| Litero | Kvanto | Procento de la totalo |
|---|---|---|
| a | 292 | 15.6% |
| b | 112 | 6.0 |
| c | 4 | 0.2 |
| ĉ | 32 | 1.7 |
| d | – | – |
| e | 150 | 8.0 |
| f | – | – |
| g | 26 | 1.4 |
| ĝ | 15 | 0.8 |
| h | 8 | 0.4 |
| ĥ | 3 | 0.2 |
| i | 251 | 13.4 |
| j | 19 | 1.0 |
| ĵ | 6 | 0.3 |
| k | 89 | 4.7 |
| l | 81 | 4.3 |
| m | 61 | 3.3 |
| n | 226 | 12.0 |
| o | 71 | 3.8 |
| p | 11 | 0.6 |
| r | 80 | 4.3 |
| s | 1 | 0.0 |
| ŝ | – | – |
| t | 113 | 6.0 |
| u | 217 | 11.6 |
| ŭ | 3 | 0.2 |
| v | 3 | 0.2 |
| z | – | – |





Divido de ĉiuj trastuditaj vortoj laŭ ilia gramatika kategorio, surbaze de 77% el la tuta vortaro.

| Gramat. kategorio | Kvanto | Procento de la totalo |
|---|---|---|
| Substantivoj | 191 | 48.6% |
| Adjektivoj | 38 | 9.7 |
| Entutaj verboj | 80 | 20.3 |
| Infinitivoj | 13 | 3.3 |
| Imperativoj | 29 | 7.4 |
| Prezenco | 31 | 8.0 |
| Preterito | 6 | 1.5 |
| Futuro | 1 | 0.2 |
| Adverboj | 4 | 1.0 |

Finaĵoj de 100 vortoj apartigitaj laŭ gramatika kategorio, nombro kaj konjugacio.

| Finaĵoj | A | | AL | | AT | | E | | EM | | EN | | ET | | I | | IK | | IM | | U | | UM | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | Si | Pl | Si | Pl | Si | Pl | Si | Pl | Si | Pl | Si | Pl | Si | Pl | Si | Pl | Si | Pl | Si | Pl | Si | Pl | Si | Pl |
| Substantivoj | 10 | 1 | - | - | - | - | 5 | 2 | - | - | 2 | - | 1 | - | 12 | 1 | 1 | 1 | - | 1 | 11 | 1 | 1 | - |
| Adjektivoj | - | - | 1 | - | 1 | - | - | - | - | - | - | - | - | - | 16 | - | - | - | - | - | 2 | - | - | - |
| Finaĵoj | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | |
| | I | K | I | K | I | K | I | K | I | K | I | K | I | K | I | K | I | K | I | K | I | K | I | K |
| Verboj | 8 | 5 | - | - | - | - | 2 | 2 | - | 5 | - | - | - | - | 1 | 6 | - | - | - | - | - | 1 | - | - |

Mallongigoj:

Si= singularo.
Pl= pluralo.
I = infinitivo.
K = konjugaciitaj verboj.

BIBLIOGRAFIO

1. F. Tabio y E. del Rey, Pre Historia de Cuba, Academia de Ciencias de Cuba, La Habana, 1966.
2. Francisco Pérez de la Riva, La Agricultura Indoantillana, Antropologia n–ro 17, La Habana, 1951.
3. Instituto de Lingüistica y Literatura de la Academia de Ciencias de Cuba, Anuario n–ro 5, La Habana, 1974.
4. Histoire Naturelle et Morelle des Isles Antilles de L'Amérique avec une vocabulaire Caraïbe, Rotterdam, MDCLVIII, aŭtoro nekonata.
5. Alfredo Zayas y Alfonso, Lexicografia Antillana, La Habana, 1914, (Diccionario de voces usadas por los aborigenes de las Antillas Mayores y de algunas de las Menores y algunas consideraciones acerca de su significado y formación).
6. Dirección Politica de las FAR, Historia de Cuba, Segunda Edicion, La Habana, abril de 1968.
7. Diversaj ekzempleroj de la Analoj de la Kuba Historia Akademio (Academia Cubana de Historia).

Adreso de la aŭtoro:

Besada Toledo, Juan Lazaro
Gervasio n–ro 62 Apto. 3, 2do piso
e/ Lagunas y S. Lazaro
C 10200 Cdad Habana
CUBA





# La Bibliofilio

Kazimierz Szczurek

## 1. Enkonduko

En la greka lingvo *biblio* signifa "la libro", kaj *phileo* – "mi amas". El tiuj du vortoj oni kreis novan terminon *bibliofilio*, kies tasko estas nomi specifan rilaton de homo al la libroj, plenan da ŝato kaj pietismo. *Bibliofilo*, libroamiko, konas librojn, ŝirmas kaj kolektas ilin, ĉar li sentas internan bezonon fari tion. Ĉiu nova akiraĵo ĝojigas lin, kaj la jam posedataj libroj estas fonto de konstantaj plezuro kaj kontento. Libroj obsedas lin, li okupiĝas pri ili, sed tio ne kauzas ke li perdas sian prudenton. Bibliofilo, diference ol bibliomano, ne estas strangulo al kiu libroj difektis la menson, sed saĝa, prudenta amiko de valoraj verkoj. Valoraj laŭ diversaj vidpunktoj.

## 2. Antikvaj tempoj

Bibliofilio en tia ĉi senco estas tiom aĝa kiom la libro mem, la libro kompreneble en ĉiuj siaj formoj. Jam en la plej antikva tempo la libro, konsistante el argilaj tabuletoj, trovis siajn favorantojn kaj kolektantojn. Ĝis nun estas viva la nomo de Asurbanipalo, asira reĝo el la jaroj 669 – 626 a.K., homo klera kiu en sia granda biblioteko kolektis abundan materialon pri la antikva historio. Kiam en la 1853–a jaro anglaj arĥeologoj retrovis lian bibliotekon kaj esploris la trovitan materialon, ili konstatis, ke la argilo de la reĝaj tabuletoj estas pli bona kaj la skribo pli bela kaj preciza. Tio sekvis verŝajne el zorgado de la reĝo mem, kiu okupigis ĉe sia kortego aron da spertaj kaligrafoj kaj atentis, ke la skribataj verkoj havu formon indan je reĝo.